Rememoroj pri Praha. Tre ĝojigis nin tiu artikolo tutpaĝa en „La Suda Stelo“ el Dec. de N. G., kiu rakontas siajn agrablajn spertojn dum kelktaga vizito de nia ĉefurbo, precipe en Radio, kie ŝi renkontis Mařík kaj Hromada kaj en E. Klubo, kie imponis al ŝi la biblioteko, prezidanto Šustr, vikleco de ĉeestantoj en la kunveno, en la Asocia oficejo, kie ŝi vidis labori s-iron Baldová. La artikolo finas per invito al Doksy.

Radio-stacio en Guarujá, la plej potenca en Brazilo (ZYJ—7 1420 kc, 211,3 metroj), disaŭdigas esperantlingve ĉiun sabaton je la 19,00 horo. (Antaŭen el 15. IX. 1948.)

La vivo. Du-monata organo de „Amikoj de la Homanarismo“. Gazeto por ideologia konstruo kaj internacia edukado. Redaktas s-ino E. v. Veenendaal-Bouwens, Administracio s-ro Siem de Geus, Heilo (N—H), Nederlando. — Numero 4—5 el Jul.—Okt. estas 64-paĝa broŝuro tre bele ciklostilita. — Enestas multaj leteroj el diversaj landoj, sed la aŭtoroj tro parolas pri si mem, pri siaj privataj sentoj, kiuj ne ŝajnas esti iel tipaj por doni imagon pri iu kolektivo. Ankaŭ tro parolemaj aspektas tiuj junuloj, kiuj rigardas grava afero diri, ke ili estas 24- aŭ 21-jaraj. Por verki estas indiferenta la aĝo. Poemoj de „junuloj“ 22-aĝaj estas iam legataj post jarcentoj. Sed temas pri malmultaj poemoj tiaj.

Filatelio. Kial La Interlingilo ne uzas tiun ĉi vorton, kiam ĝi estas uzita en faka terminaro tre disvastigita?

**La brava Hannoverano.** (El Esperanto-Lernanto, Hannover-Hainholz, n-ro 9 de Sept. 1948. Represo kun ĉiuj eraroj.):

Lutage la fama angla generalo Elliot trarajdis mem la fortikaĵon de Gibraltaro por kontroli la postenojn. Estis ĝuste dum la tempo, kiam la fortikaĵoj ege estis alparafitaj, kaj li renkontis gardstarantan soldaton hannoveran, kiu nek ekpemis sian pafilon, nek prezentis ĝin, sed nur staris tie senmove kiel statuo.

„Ĉu vi ne konas min, mia filo?“ demandis la generalo. „Aŭ kial vi ignoras mian devon?“

La soldato respondis kun la rezignacio: „Mi bone konas mian Moŝton kaj ankaŭ mian devon. Sed oni ĵus forpafis la fingrojn de mia dekstra mano, pro kio mi ne kapablas sekvi la preskribon.“

„Kial vi ne jam bandaĝigis la vundon?“ daŭrigis la generalo.

„Ĉar en mia patrujo,“ rediris la soldato, „ne estas permesite forlasi la postenon antaŭ ol oni estas anstataŭata.“

Videble emociite nun la generalo sin deĉevaligis kaj postulis: „Donu al mi viajn pafilon kaj kartoĉujon, por ke mi anstataŭu vin, dume vi estos bandaĝata!“

La soldato obeis, sed unue iris al la plej proksima gardistaro, anoncante sian anstataŭon per la generalo kaj petante anstataŭanton por tiu. Tiam li kuracigis sian kripligitan manon.

Estante ne plu kapabla por militservo, oni eksigis lin. Sed la generalo al li faris rimarkindan donacon; kaj ankaŭ la reĝo Georgo III farigis donacon al la bravulo alveninta al Londono kaj nomis lin standardisto inter hannoveraj landotrupoj.

Estas vera tipo de aŭtentika Hannoverano.

Kiel kortuŝe! Sed senŝerce: Jen instruo kaj averto! La vera germana spirito renaskiĝas el cindro kaj ruinoj. Ni ĝisatendos ankoraŭ esperantlingvan glorigon de la heroaj agoj lastmilitaj; nun sufiĉu ĉi tiu modesta aludo pri pasinto. Ĝi montras, en kio vere distingiĝas la granda germana popolo.

Kaj ni komprenu ĝis fino: La germanoj batalos same heroe en fremda servo, se ili provizore ne havas okazon dediĉi sin al tiu dioplaĉa okupo por pli granda gloro de nacio propra. (O. G.)

**Aŭstria Esperanto-Revuo aperas daŭre en tre belaj kajeroj** trimonataj, kio ebligas, ke la kajero estas efektive impona broŝuro, ekz. n-ro 4—6 de la tria jaro 24-paĝa. Tiuj eldonaĵoj multe pli imponas ol svarmantaj multobligataj folioj, ofte eĉ malbone legeblaj. En aludita numero ni legas inviton, ke esperantistoj skribu al Unuiĝintaj Nacioj (United Nations, The General Secretary, Lake Success, USA), ĉar la ĝenerala sekretario Trygve Lie deklaris, ke li ricevis centojn da leteroj el la tuta mondo, sed eĉ ne unu en Esperanto.

**Pri ĉinaj intelektuloj diras Cun-Can-Jeh en Sennaciulo** (Sept.): Preskaŭ ĉiam la viroj, kiuj fondis la ĉinajn dinastiojn, estis kamparanaj gvidistoj de malsatantaj kaj ribelemaj terkulturistoj, aŭ ĉefoj de duoncivilizitaj gentoj kiel de mongoloj aŭ manĉuoj. Sed tiam, kiam la nova imperiestro estis firmiginta sian potencon, li ĉiam denove invitis la intelektulojn al sia kortego por helpi lin ĉe la regado, kondiĉe, ke la kleraj gastoj estu pretaj ĵuri fidelon al la nova funkciulo. Kaj post tio la ŝtata maŝino ree funkciis kiel antaŭe, dank' al estimo, kiun la intelektuloj ĝuis ĉe amaso.

**Esperante parolanta filmo pri Budapeŝto.** La estraro de la hungara ĉefurbo fabrikigis interesan filmon titolitan „Budapeŝto vivas denove“ kun klariganta parolo en Esperanto. La bela filmo montras la faman mezeŭropan metropolon en ĝia antaŭmilita brilo kaj en ĝia postmilita ruina stato, kaj la fervoran laboradon rekonstruan. La filmo destinita por prezentado en eksterlando jam estis montrata antaŭ la nederlanda publiko, kiam la esperantista hungara parlamentano s-ro Stefano Csurgai prezentis ĝin en Hago la 23-an de Septembro 1947. La filmo estas parolata de la eminenta hungara Esperanto-poeto Julio Baghy. En la filmo aperas ankaŭ ĉefaj aktivuloj de la hungara Esperanto-movado, kaj ili alparolas la publikon. (Por informoj rilate al la prezentado de la filmo oni povas turni sin al s-ro Stefano Csurgai, Ullői-ŭt 89/a V. 2. Budapeŝt IX.

**Esperantista Teatro** estis fondita en Germanio en Septembro 1948. Ĝi volas esti profesia migranta teatro intencanta aktori bonajn teatraĵojn al multaj landoj. Ĝi prezentos teatraĵojn en Esperanto kaj en la germana. Tiuj ĉi estos uzataj por propagandi nian lingvon. Informojn donas kontraŭ respondkuponon Prof. A. Steynhardt, (23), Lünen (Westf.) Viktoriast. 39d, Germanio.

**Artikolon de Ruda Kychler „Generalo“**, kiu kontrastigas la sintenon de ĉefoj al generalo aŭstria dum jaroj antaŭ la 1914 kaj dum nuna nia popoldemokratia reĝimo, publikigis „La Esperantista Laboristo“ (Nov.—Dec. 1948) en traduko de Vlad. Slany.

**Svit, la industria metropolo sub la Altaj Tatroj** estas artikolo „komunikita de la Esperanto-grupo en Svit“ en La Laborista Esperantisto el Nov.—Dec., kiun ni legis kun sincera plezuro.

**Nederlandaj filmoj parolas en Esperanto.** Nederlanda Ministerio de Rekonstruado lasis postsinkronizi en Esperanto tri el siaj speciale fabrikitaj filmoj pri la postmilita rekonstruo de Nederlando por prezentado en la eksterlando. La tri filmoj estas la sekvantaj: „Reveno“ (filmo pri la postmilita reveno de la evakuita loĝantaro de la urbo Arnhem al la detruitaj hejmoj); „Walcheren“, (la rekonstruo de la mardigo de la insulo Walcheren, detruita dum la milito per bombardado); „Detruita lando“ (filmo pri la postmilita aspekto de Nederlando kaj pri rekonstruaj klopodoj). La tri filmoj post prezento en Hago estis transsenditaj al Ameriko, kie s-ino Julia Isbrucker prezentadis ilin en kunveno dum sia prelegvojaĝo tra Usono. (La Reveno kaj Walcheren estas parolitaj de Andreo Cseh, la Detruita lando de s-ino Isbrucker. La filmojn fabrikis kaj en Esperanto postsinkronizis la filmfabriko „Mulifilm“ en Haarlem. (La Praktiko, Jan. 1948.)

**Artikolo de Dr W. J. Manders „Esperanto kaj lingvistiko“** el nia dua jarkolekto aperis en angla traduko en organo de la Aŭstria E-Asocio „La Rondo“ en Maja numero 1948.

**Pri bezono klopodi, ke revenu en movadon tiuj homoj, kiuj jam iam Esperanton studis kaj aktive partoprenis en nia agado,** skribas tre trafte en Laborista Esperantisto (Sept. 1948) s-o Nieuwenhuizen. Tiuj „eksesperantistoj“ ja vere interesiĝis pri nia ideo, ili jam iam decidis ekstudii nian lingvon, ili jam iam estis anoj de nia movado, ili do jam partoprenis nian ideon, kiun ili poste ial ajn forlasis. Ni penu reveki iliajn interesojn, studemon kaj vigecon. Ili multe pli valoras por nia ideo ol granda parto el la laiko-publiko, kiu tamen jam post ioma tempo adiaŭas nin kaj ĉiujare re-malaperas en la amason, el kiu ili lasis sin forloĝi kelkan tempon.

**Japanlingva radio-dramo „La naskiĝo de Esperanto“**, verkita de Mijake-Sihej, en kiu rolas Zamenhof kaj Waldenberg, estis disaŭdigata de Radio-Tokio II (JOAK) la 5-an de Majo kun reĝisoro Sugisaka Aoyama. La tekstoj aperis esperant-kaj japanlingve en Revuo Orienta Julio—Aŭg. 48.

**Kontraŭ provoj enkonduki novan E-ortografion** sen persignoj decide kaj saĝe argumentas H. J. en „Esperanto“ el Decembro. Ni plene konsentas kun tiu ĉi malaprobo. Efektive „ĝeneraligo de internacia lingvo dependas de aliaj faktoroj, tre malproksimaj al la lingvaj detaloj“.

**Versojn de Karolo Piĉ** kiel ekzemplon de trafa poezia priskribo uzis Brendon Clark en Esperanto (Dec.). Temas pri strofo

La poet' similas  
iam al monaĥ'  
kiu, malgraŭ multaj  
ho kaj multaj afi  
skizas sanktan libron.

„La akcentitaj vortoj elvokas tre klaran ideon pri la monaĥo, ĉu ne?“

**La Dharmo**, la oficiala organo de la Societo por Orienta Kulturo, fondita en 1946, aperas ciklostilite (po 4 paĝoj 23×37 cm) eldonata de Upasaka Anurudha Petri, Venavāgen 49, Örebro, Svedio. En kajero sen dato kaj sen numero, kiu nin atingis kaj kiu laŭ nia konjekto estas jam la 16-a, ni legas pri Nirvano, Kiel mi fariĝis Budhano, pri La plej granda imperiestro de Hindujo kaj aliajn informojn. — Ni preferas diri laŭ la Plena Vortaro „Budao“, „budaismo“, „budaano“.

**La Praktiko**, la gazeto de la mondpopolo, aperanta en Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando, estas eldonata kaj redaktata de la Universala Ligo, kies ĉefa celo estas pledo por tutmonda registaro. (Abonprezo 6 nederl. guldenoj). En la triobla numero el Jul.—Sept. ni legas interesan intervjuon en la Geneva Radio de s-ro Henri Koch, Luksemburgano, pri la festoj en Frankfurto, kiuj rememorigadis la jaron 1848 kaj tiamajn demokratiajn tendencojn kaj farojn, devizo de lia temo estis Germanio kaj Eŭropo. El la rubrikaj de tiu ĉi numero ni menciuj laŭde precipe la „Panoramon“, kiu enhavas efektive diversajn informojn tre interesajn.

**Aŭstria Esperantisto** estas ciklostilita organo de Internacia Esperanto-Muzeo, redaktata de kortega konsilanto H. Steiner. Sian numero Aŭg.—Sept. ĝi dedikas komplete al dokumentoj pri samtempa enkonduko de deviga instruado de E. en pluraj landoj. Al ni ŝajnas, ke predikado esperantlingva al esperantistoj ne tro utilas por tiu celo. Tamen nia Asocio sekvis la inviton kaj anoncis sin por kunlaborado per sia Lerneja Komisiono.

**Esperantologio**. Internacia revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto anoncas sian ekaperon por la proksimaj monatoj. Detalojn vidu sur paĝo 7 de nia tria jarkolekto. Esperantologio aperos en kalendaroj 48—64-paĝaj, formantaj volumon de 250—300 pĝ. La abonpago por unu volumo estas 250 Kčs kaj akceptas ĝin nia Librovendejo. La jamaj anoncintoj bonvolu sendi la sumon al poŝtŝpar-kasa konto de EAĈSR kun klara noto: „Esperantologio“.

**Akrajn vortojn kontraŭ Ĉeĥoslovakio**, diritajn en Amsterdamo kongreso, refutas en sia letero, enpresita en Senaciulo (Dec. 1948) samideanino Marie Bartovská (Úpice 2). Ni citas el ĝi: „En unu punkto la parolintoj parte pravas: En Ĉeĥoslovakio ne ekzistas libereco — sed nur libereco por ekspluati la homojn. Ĉu SAT deziras ion alian?“ Al ni ŝajnas strange, ke la redakcio de S. presis tiujn gravajn informojn sole inter en la rubriko „El niaj leteroj“ por akcenti, ke ĝi rigardas ilin kiel tre privatan opinionon.

## SCIIGOJ

**Ĉeĥoslovaka kongreso tiujara en Liberec** la 4—6-an de Junio fariĝos grava manifestacio de ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Krom diskuto pri nia agado laŭ kutima formo, kiu okazos dimanĉon posttagmeze, ni aranĝos dimanĉon antaŭtagmeze solenan malferman kunsidon, en kiu ĉeĥoslovakaj esperantistoj denove solene deklaras sian volon kaj povon uzi eblecojn de esperantaj organizoj por kunlabori al taskoj de socialisma planado. Precipe ni deklaras nian konvinkon batali por paco kaj kontraŭstari ĉiun imperialismon; eblecoj informi laboristajn klasojn de la tuta mondo per unusola lingvo devas esti uzataj por celoj de la paco ankoraŭ pli intense. Krome ni deklaras niajn proponojn por konkreta tuja uzo de Esperanto al informo de la mondo pri ĉeĥoslovakaj vidmanieroj. Samtempe ni dankos al publikaj aŭtoritatoj pro la helpo kaj apogo jam donitaj, precipe al ministerio de Informoj kaj Klerigo, kiu per larĝvida decido ebligis ampleksan uzon de Esperanto en ĉs. disaŭdigo, eldonadon de Esperanto-Servo kaj aperigon de esperanta traduko de ĉs. konstitucia ĉarto. London antaŭtagmeze ni diskutos kelkajn principajn problemojn por nia laborado. — Krom tiuj ĉi laborkunvenoj la Loka Kongresa Komitato aranĝos plurajn distrajn entreprenojn, kiuj tre agrabligos la ĉeeston en la kongreso. La urbo mem estas nepre vizitinda por ĉiu, same por tiu, kiu ne vidis ĝin ankoraŭ, kiel por tiu, kiu jam konas industriajn metropolon de Norda Bohemio. Ĝi ja estas grava turista centro en pejzaĝo ekstreme bela. — Sabaton vespere estos interkonatiĝa vespero kun danco, dimanĉon koncerto kun esperantista programo. Kiu volus viziti la teatron, tre laŭdatan, sciigu tion en la aliĝilo, LKK rezervigos enirkarton por vi! — En tiu ĉi numero estas enmetita aliĝilo kun poŝta pagilo. Ĉiuj, kiuj intencas viziti la kongreson, bonvolu pleniĝi ĝin kiom eble plej baldaŭ kaj sendi al la adreso: Esper. Klubo en Liberec I, Šamánkova tř. 4a.

La 22-a SAT-kongreso okazos en Parizo la 30-an de Julio ĝis la 6-a de Aŭgusto. Kotizoj: SAT-anoj 1,75 dolaro, post la 1-a de Majo 2 dolaroj. Por ne SAT-anoj 2,25 dolaroj, post la 1-a de Majo 2,75 dolaroj.

**Svisa Espero**, oficiala organo de Svisa Esperanto-Societo (Eigenheim, Romanshorn), aperas en j. 1949 denove presita. Ĝi estas pruvo, ke la movado en Svislando plifirmiĝis. Ni tion enskribas kun ĝojo. Svisaj esperantistoj suferis dum la milito pro propagando de Basic English. Ke ilia organizo jam nun denove povas prezenti sin per bulteno presita, estas dokumento, ke Basic English ne detruas nian movadon eĉ se ĝi ŝajne havas tre bonajn kondiĉojn. Krome ni rimarkigu, ke tiu ĉi jarkolekto de Svisa Espero estas jam la 45-a.

**Winston Churchill kaj Basic English**. En la konferenco kun ĵurnalistoj en Kubo la 4-an de Feb. 1946 li rekomendis al ili pledi por Unuiĝintaj ŝtatoj de Eŭropo kaj ke ĉiu membro de tiuj unuiĝintaj ŝtatoj lernu krom la gepatra lingvo Basic English. Ĉar oni ne sukcesas kun angla lingvo, oni provas nerektan vojon. (Aŭstria Esperantisto, Okt.—Dec. 1948.)

**Monda Tribuno**, Internacia gazeto por kulturo, literaturo, scienco kaj tekniko (Vieno IX, Rossauerlände 27, Aŭstrujo). Monate. — Depost Januaro aperas tiu ĉi nova gazeto en ĵurnala formo 4-paĝa. Ni vidis numerojn de Januaro kaj Februaro. Ni ne komprenas bone intencojn de tiu ĉi nova gazeto. Ĝi signifas konkurencon al Heroldo de Esperanto sed estas multe malpli interesa. Ŝajnas al ni tia neplanata eldonado malutila al evoluo de nia gazetaro, precipe kiam ŝajnas, ke la nova gazeto ne havas ian novan ideon. Redaktoro de M. T. estas Gabriel Katzianka.

**La Horizonte** estas organo de Esperanto-Societo de Agrokultura Fakultato de Nihon-Universitato. La unua numero, 30-paĝa, ciklostilita, redaktata de Oi Haruka, aperis la 5-an de Nov. 1948. Tre interesa enhavo de teknikaj artikoloj: Pri sakeo, La nova studado de furaĝo, Kemio de japanaj mangajoj kaj ceteraj.

**Pri komenco de la telegrafo en Ĉeĥoslovakio** raportas laŭ Rudé právo el 2. IX. 48 en La Interligilo (Sept.—Okt.) Ŝa.

**Internacia Federacio Esperanta Fervoĵista** okazigos sian unuan kongreson en Aarhus, la 22—27-an de Majo 1949. La kongresa kotizo 15 danaj kronoj (3 Usonaj dolaroj). Post la 1-a Februaro la kotizo altiĝas je 5 kronoj. Aliĝiloj kaj ceteraj informoj estas riceveblaj de la kongresa sekretario, Hohn, Christoffersen, Hallssti 43, Aarhus, Danlando.

**Junulara Fako ĉe Bulgara Esperanto-Asocio**, str. Tri uŝi 15, Sofio, petas progresemaĵajn samideanojn sendi al ĝi materialon kun junulara enhavo. La materialo estos publikigota en la revuo Internacia Kulturo, kie de nun aperos konstante kolono Junulara vivo, aŭ en iu nacia gazeto. La sendinto ricevos ekzempleron de la gazeto, en kiu aperis lia sendaĵo.

**Tutmonda Asocio Socikredita** (TASK) fondiĝis la 28-an de Aŭgusto en Londono. TASK estas kultura organizaĵo nepolitika, kiu celas disvastigi la scion pri Socikredito per Esperanto kaj la scion pri Esperanto inter la Socikreditano. La sola oficiala lingvo de TASK estas Esperanto, la jarkotizo estas 2 ŝil. kaj 6 pencoj aŭ 5 respondkup. Pliajn informojn (enmetu respondkup.) donas la honora ĝen. sekret. s-ro J. W. Leslie, Ĉe BM/TASK, London, W. C. 1.

**Helpu la portugaliajn esperantistojn!** La portugala esperanto-movado nun renaskiĝas sub la malsimpatia rigardo de la tiea registaro, tial ĝi bezonas la helpon de ĉiuj esperantistoj. Helpu tiujn samideanojn sendante unu Esperanto-libron por ties „Cirkulanta Biblioteko“. Sendu al: Portugala Esperanto-Ligo, Apartado 125, Lisboa N.

**Esperanto-Asocio en ĈSR**, Loka Grupo Vsetín, aranĝos Esperanto-standon en ekspozicio „Valaĥio laboranta“, okazonta en Julio kaj Aŭgusto 1949. La grupo deziras aranĝi ankaŭ esperantistan laborkunvenon en kadro de la ekspozicio kaj tre ŝatus bonvenigi eksterlandajn samideanojn. Pri anoncintaj vizitoj informos oficiala bulteno de la ekspozicio. Oni fikso la daton de la kunveno laŭ la alveno de eksterlandaj samideanoj.

**Radio-Praha.** De la 10-a de Aprilo estas en Ĉeĥoslovakio enkondukita somera tempo. La elsendoj sur mallongaj ondoj okazos je la

15,30—15,45 GMT (17,30—17,45 de la ĉs. somera tempo), 25,34 m, 1935 m.

21,00—21,15 GMT (23,00—23,15 de la ĉs. somera tempo), 31,41 m.

Ĉiuj ceteraj elsendoj por ĈSR sen ŝanĝo, por fremdlando je unu horo pli frue.

**Radio-Sofia** havas novan ondolongon dissendante nun je la 19,50 horo de MET ĉiun vendredon sur 39,11 metroj prelegojn pri socia, kultura, ekonomia kaj politika vivo en la nova demokratio Bulgario.

**Ekspozicio de dokumentoj pri nia movado en Liberec** en la urba muzeo la 22. V. — 6. VI. okaze de nia kongreso estas grava entrepreno. Pro ĝia graveco ni petas ĉiujn samideanojn, ke ili pruntu aŭ donacu al la Klubo en Liberec materialon taŭgan por ekspozicio. Taŭgas ĉiuj esperantaj: Libro, gazetoj, afiŝoj, glumarkoj, cirkuleroj, foto-grafajoj. Pruntitaj objektoj estos resenditaj post la ekspozicio, donacitaj restos en Liberec, kie la Klubo posedanta ampleksajn ejojn, akceptos esti administranto de la Asocia ekspozicia materialo. Ni rigardas tiun ĉi alvokon tre grava kaj tre petas samideanojn respondi al nia peto kaj sendi ĉion, kion ili mem ne bezonas. Por unuopulo sentutilaj papteroj estas grava materialo uzbla por ekspozicia celo, se oni ĝin konservas, priskribas kaj ĝigas alirebla por neesperantista publiko. Ĉion sendu al Esperantista Klubo en Liberec, Šamánkova 4a.

## ESPERANTISTA VIVO

**Antonín Hladík** en Kostelec n. L. atingis la 28-an de Februaro 80 jarojn. Esperantisto li fariĝis antaŭ unu jaro. Estante pensiulo li dediĉas sian tutan tempon por varbi al nia movado. Vojaĝante el urbo al urbo li disdonas propagandan materialon kun modela oferemo. Li estu salutita de ni ĉiuj!

**Cindro de s-ro Konstantín Koutek** estis deponita en kolumbario de Strašnice, sekcio II, kampo XXII nro 21.

**Naskiĝo.** Al ĝes-anoj Elena kaj Ján Mikloš en Ĉakanovce, p. Herľany, naskiĝis la 31-an de Decembro 1948 filineto Ruženka (Rozeto).

### Důležitá sdělení.

Toto třetí číslo rozesíláme hromadně všem členům, jejichž příspěvek nám došel do 28. 2. 1949. Čtvrtý den po této hromadné expedici rozesíláme časopis těm, kdo zaplatili v první polovině března a za dalších 7 dní všem, kteří zaplatili do konce března.

Do 28. 2. přihlásilo se a zaplatilo pro rok 1949 849 nových členů, a celý náklad čísla 1 a 2 jest nyní rozebrán. Pro několik z těch, kteří platili v druhé polovině února, se nám dokonce již ani tato čísla nedostávají. Předpokládáme, že někteří loňští členové nám je po upomenutí vrátí, a až je odešleme novým členům, kterým nyní chybějí, budeme mít teprve větší radost z tak pozoruhodného počtu nových členů. Jelikož nemůžeme pro úřední nařízení o úspoře papíru zvyšovat náklad, nezbude nám asi, než opět uplatňovat dosavadní zásadu, že člen má nárok na bezplatné zaslání časopisu počínaje dnem dojití členského příspěvku, a prosíme, abyste takto informovali nové zájemce.

Legitimace nových členům jsou v tuto chvíli rozesílány všem, jejichž příspěvek došel nám přímo do 28. 2. Noví členové místních skupin dostávají legitimaci přímo u svých skupin. Ti, kdo byli již členy v roce 1948 (ať již přímo nebo prostřednictvím místních spolků) mají již legitimaci, platnou pro rok jejího vystavení, t. j. rok 1948 a prodlouží její platnost vlepením zde otiskné známky. Proto také třetí číslo nedostává nikdo, kdo nemá pro rok 1949 zaplacenou. Znamku si nevystihnou a do legitimace nevěpí ti členové, kteří přistoupili až v roce 1949 a jejichž průkaz je tedy platný pro tento rok bez vlepení známky, neboť jest v něm již prvý rok platnosti vyznačen letopočtem 1949.

Každý člen Svazu, který nutně potřebuje servokuponaro pro styk s delegáty UEA, má na jeho vydání — jakožto kolektivní člen UEA — nárok a může si je u nás vyžádat zvláštním stručným lístkem, na kterém neuvede jiného přání nebo sdělení.

Ti, kdo přes naše upozornění poukázali nám příspěvek přímého člena UEA nebo předplatně Herolda, mají u nás poukázané částky uloženy a mohou s nimi disponovat, oznámili nám zvláštním lístkem datum poukazu a číslo šekového účtu, kam byly poukázány.

Slovníku česko-esperantského vyšly stránky 105—152. Chybějí první stránky slovníku dáme do tisku 16. dubna, načež je dostanou všichni, kteří se podle našich dříve v výzev o ně přihlásili, i ti, kteří se přihlásili do 15. dubna. Na pozdější reklamace nemůžeme vzít zřetel.

## Letní kolej esperanta v Doksech

(Somera koleĝio de Esperanto en Doksy)

16.—30. VII. 1949

### II. zpráva:

S kursoj budo spojena ĉada ŝpoleĉenských podniků pro odpoledne a večery, m. j. celodenní autokarový výlet do sever. Polabí. — Ubytování bude pouze v soukromí. Pomýšlí se i na společné ubytování těch, kdož o ně projeví zájem, a na stravování v závodní kuchyni. — Počet žactva je omezen na 200; přihlášky se přijímají jen do 15. VI. — Školné za 48 hod. kursu nebo seminář a návštěvu cyklu odb. přednášek, ubytovné a účast na společenských podnicích (vyjma jízdné autokarem) činí celkem 780 Kčs. (Ubytovaným ve společných noclehárnách vrátí se po příjezdu do Doks rozdíl ubytovacího poplatku.)

Přihlášky na adresu: Letní kolej esperanta v Doksech se současným zasláním uvedeného obnosu bílko-složenkou na šekový účet 66421 Spořitelny v Doksech (s poznámkou »L. kolej esperanta«) přijímají se již nyní. Pospěšte si s přihláškou vzhledem k zájmu, který se již projevuje. — Propagační prospekt vyjde 1. V. Vyžádejte si jej!

(Další zprávy v příštích číslech.)

## Letní škola v Rožnově pod Radhoštěm

od 1.—15. VIII. 1949

### Denní pořad:

Ráno o 8. hodině snídaně.

Dopoledne od 9 do 12 hodin vyučování.

V poledne od 12 do 13 hodin oběd.

Odpoledne od 13 do 15 hodin odpočinek.

Odpoledne od 15 do 20 hodin výlety do okolí.

Večer od 20 hodin zábavný program.

Závazná záloha 500 Kčs.

Prospekty a přihláškový formulář zasílá poděpsaný výbor.

Krajský výbor Letní esperantské školy v Rožnově, Ostrava I, hotel Imperial.

**Al abonintoj de Literatura Mondo kaj Internacia Kulturo.** Nia Librovendejo informas, ke ĉiuj abonoj estis transdonitaj al la eldonejo. Apero de IK kaj LM prokrastiĝis, la abonintoj bonvolu pacienci.

K tomuto číslu je přiložena přihláška na VII. celostátní sjezd československých esperantistů v Liberci se složenkou na poukázání sjezdového příspěvku (50 Kčs). Doporučujeme našim čtenářům, aby se přihlásili co nejdříve zasláním přihlášky na adresu Esperantista Klubo en Liberec, Šamánkova tř. 4a.

### TUTKORAN DANKON

al ĉiuj, kiuj salutis min okaze de mia 65-jara naskiĝtago. Sanon kaj sukceson al ĉiuj deziras

Julie Šupichová

Vychází měsíčně (10krát do roka). Majitel, vydavatel a nakladatel Svaz esperantistů ĈSR v Praze XIX/7, p. příhr. 7075. Odpovědný zástavec listu Dr Stan. Kamarýt. Členům Svazu zdarma. Členský příspěvek 70 Kčs. Účet pošt. spoř. 9.602. Tiskne »Čik« v Karl. Varech. Účast na poštovní novinové službě povolena řed. pošt. v Praze č. j. 1A-Gre-2372 OB-48. Dohledací poštovní úřad Praha 25.